

Михаил Юрьевич Лермонтов,
Родина

Люблю отчизну я, но странною любовью!
Не победит ее рассудок мой.
Ни слава, купленная кровью,
Ни полный гордого доверия покой,
Ни темной старины заветные преданья
Не шевелят во мне отрадного мечтанья.

Но я люблю — за что, не знаю сам —
Ее степей холодное молчанье,
Ее лесов безбрежных колыханье,
Разливы рек ее подобные морям;
Проселочным путем люблю скакать в телеге
И, взором медленным пронзая ночи тень,
Встречать по сторонам, вздыхая о ночлеге,
Дрожащие огни печальных деревень.

Люблю дымок спаленной жнивы,
В степи ночующий обоз,
И на холме средь желтой нивы
Чету белеющих берез.
С отрадой многим незнакомой
Я вижу полное гумно,
Избу, покрытую соломой,
С резными ставнями окно;
И в праздник, вечером росистым,
Смотреть до полночи готов
На пляску с топаньем и свистом
Под говор пьяных мужичков.

Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas Михаил ЮРЬЕВИЧ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-16 – †1841-07-27).

Arg-946-1902 (2013-12-10 18:54:55)

Pri la poeto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Lermontov. La ruslingvan tekston de la poemo mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://www.sbornik-stihov.ru/lermontov326.html>.

Михаил Юрьевич Лермонтов,
La patrio
tradukita de Konstantin Gusev

Patrion amas mi, sed per la sento stranga!
Ne venkos ĝin prudento. Kaj ne gloro
Gajnita brave en la lukto sanga,
Nek de la paci viv fiera floro,
Nek de la oldaj tempoj mit' praava
Min provus veki al la revo rava.

Sed amas mi, sen scii mem pro kio,
Silentan vaston de la stepoj fridaj,
Inundon de l'riveroj jam senbridaj,
Senbordajn arbaregojn de Rusio.
Mi amas laŭ la kampaj vojoj tristaj
Veturi ĉare tra la stepa foro,
Serĉante tremon de la fajroj distaj,
Vilaĝon kaj azilon por nokthoro.

Mi logas la fumet' maldolĉa
De la falĉita grenkamparo,
Sur la monteto - geo sorĉa:
La blanka svelta betulparo.
Kun ĝoj', por multaj nekonata,
Mi vidas la draſejon plenan,
Orbrilon de la pajlo ĥata,
Vesperon rosan kaj serenan.
Kaj dum la festo kamparana
Min ravas ĝis la horo tarda,
Kun fajf' ebria akompana,
La vilaĝana danco arda.

Traduko de la Rusa poemo “Rodina” de МИХАИЛ ЮРЬЕВИЧ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-16 – †1841-07-27) *en Esperanton de* KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).

Arg-946-1905 (2013-12-10 13:10:07)

Tiun ĉi esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la revuo “Moskvaj Novaĵoj”, prov-numero en Esperanto de Aprilo 1989. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Konstantin_Gusev.